



B I L E T O    D E    L A    P R E Z I D A N T O

=====

Avec l'approche de la nouvelle année, qui pour tous les chrétiens est liée aux célébrations de la manifestation du Christ au monde, Noël et l'Epiphanie, c'est dans une perspective universelle que notre bulletin vous apporte les vœux de votre Estraro.

Bonne année, sans doute, pour les personnes et les familles; mais aussi nous formons le souhait que notre mouvement progresse, développe son efficacité, appote aux hommes qui veulent que les peuples connaissent la vraie paix, ce puissant moyen d'un langage qui les rapproche et les aide à mieux se comprendre pour mieux s'estimer.

L'Année 1974 doit, avant tout, être favorable à plus de compréhension entre ceux qu'une même foi devrait unir fraternellement, et qui, bien que professant le même Evangile, demeurent divisés par le lourd héritage d'une histoire chargée de mésententes, de querelles, de persécutions.

Malgré la conjoncture, il faut poursuivre cet effort pour effacer les préjugés que les différences de cultures, les frontières géographiques ou politiques, érigent comme des barrières entre les communautés nationales ou ethniques qui se sont le plus souvent opposées ou ignorées mutuellement.

Que l'appel des disciples de Zamenhof, appartenant aux milieux de toutes tendances, atteigne en profondeur les hommes de tous les pays et de toutes langues, afin que l'utilisation d'un même moyen de communication, porteur de cette "interna ideo" préconisée par le Maître, devienne, en se répandant, un lien matériel et moral situé en dehors et au-dessus des rivalités de langues, et de cette forme de colonisation des esprits qui résulte de la pression exercée, dans les instances internationales, par ceux qui se qualifient de "grands" et entendent exercer une suprématie sur le monde entier.

Il nous appartient, à nous qui nous disons fils du même Père, et Lui disons chaque jour "Que ton règne vienne" de mettre tout ce qui est à notre disposition à Son service; et, puisque l'Espéranto peut participer à l'avance de l'humanité vers cette unité qui est sa vocation, nous devons tout faire pour la diffusion de la pratique de notre langue, et, parmi ceux qui partagent nos objectifs, être

.../...

.../...

les témoins de notre marche, avec le Christ, vers le salut de tous les hommes.

C'est le voeu que nous formons pour tous; la tâche est immense; elle sera, un jour, le fruit d'une multitude de petits progrès : à nous d'en être les artisans.

R. Cl. COLAS.

=====

V I V I V O S

=====

READMONO : 30 - 15/20-...

Rigardu, mi proponis al vi hodiaù la vivon kaj bonon, kaj la morton kaj malbonon; ordonante al vi ami la Eternulon, vian Dion, iri laù Liaj vojoj, kaj observi Liajn ordonojn kaj Liajn decidojn, por ke vi vivu kaj multiĝu, kaj por ke vi benu la Eternulo, via Dio, en la lando, en kiun vi venas, por ekposedi ĝin. Sed se dekliniĝos via koro kaj vi ne aŭskultos kaj vi lasos forlogi vin kaj vi ador-kliniĝos al aliaj dioj kaj servos al ili : en tia okazo mi sciigas al vi hodiaù, ke vi pereos, ke vi ne longe vivos sur la tero, sur kiun vi transiras trans Jordanon, por veni tien kaj ekposedi ĝin. Mi atestigas pri vi hodiaù la cielon kaj la teron : la vivon kaj la morton mi proponis al vi, la benon kaj la malbenon; elektu la vivon, por ke vi vivu, vi kaj via idaro, amante la eternulon, vian Dion, aŭskultante Lian voĉon kaj alkroĉante vin al Li; ĉar Li estas via vivo kaj via longatempeco de loĝado sur la tero, pri kiu la Eternulo ĵuris al viaj patroj, al Abraham, al Isaak, kaj al Jacob, ke Li donos al ili.

Meditado : Dio proponas sian aliancon, ekskluzivan kaj "ĵaluzan". La vojo al la kredo estas unika; ne ekzistas alia. Ĉar la idolkulto estas homa produktaĵo, ĝi kondukas al senelirejo : la morto. La adoro estas Dia savo; ĝi kondukas al la liberigo. Ni provu pli bone ekkoni la nenuligeblan promeson de Dio. Li ne estas adorata kaj preĝata, por ke la homo estu subpremata sed por ke vivu la homo.

(El "Vie chrétienne N° 154)

XX

O M A Ĝ O A L Y V O N N E P A U L I E R  
=====

Invitita kiel reprezentanto de nia katolika asocio la 9-an de novembre 73 por prelegeti pri F-ino Paulier okaze de literatura vespero memore al pluraj mortintaj esperantistoj, nia ĝenerala sekretario montris kiel admirinda esperantistino ŝi estis kaj li daŭrigis :

.../...

.../...

"Alia flanko de ŝia persono meritas esti pli bone konata; mi aludas ŝiajn spiritajn kvalitojn.

Katolikino, ŝi estis fidela al sia religio. En sia paroĥo ŝi helpis la kompatindajn enmigrintojn instruante al ili la francan lingvon. Ŝi estis aktiva membro de la Asocio de katolikaj esperantistoj, partoprenante la kunvenojn eĉ se tio okazas en malproksima lando. Ekzemple ŝi pilgrimis Jerusalemon.

Mi konservas bileton de ŝi skribitan la 17-an de decembro 1968. Sur ĝi estas la vortoj de la preĝo "Anĝela saluto". Jen la teksto :

Saluton Maria, gracoplena, la Sinjoro estas kun vi, benata estas vi inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo. Sankta Maria, Dipatrino, preĝu por ni, pekuloj, nun kaj en la horo de nia morto. Amen.

Kvankam religiema, F-ino Paulier estis tolerema, amante - laŭ la vorto de Aragon - tiun, kiu kredas la ĉielon kaj tiun, kiu ne kredas. Ŝi partoprenis la ĉiujaran bankedon de SAT, la kunvenojn de "Ma Bourgogne" kaj kun admiro parolis pri la aktivuloj de la Franca Esperantista Packomitato.

F-ino Paulier la 1-an de aŭgusto 1972, ŝi estis 72-jara; oni ne entombigis ŝin, ĉar ŝi donacis sian korpon al la Fakultato pri Medicino kaj ŝiajn okulojn al la blinduloj. Multaj geamikoj ĉeestis la meson memore al ŝi.

Dank' al F-ino Paulier por la unua fojo en Paris estis meso en Esperanto.

Ivona PAULIER : dankon ! "

DESPINEY Roger.

+++++

L I N G V A      A N G U L O

=====

Aldonaj kontribuajoj al la proponoj de la N° 97 venis de F-ino Chatelus (C) kaj S-ro Kraemer (K): (nur novaj tradukoj ni indikas)

- 1) malfanfaroni (C); reignacie kliniĝi al sintrudanta volo (K)
- 2) progresi ĉiuflanke (C); plilarĝiĝi, plialtiĝi (K)
- 4) elspezi senpripense, malŝpari senzoge (C); elspezi malŝparege sian monon (K)
- 5) ne ricevi Kompenson (C); ne ricevi la atenditajn rekompencojn (K)
- 6) noti la riproĉon (C); sin teni trankvile, sin reteni (K)
- 7) preni por si la plej belan parton (C); preni la plej ampleksan parton (K)
- 8) aĉeti eĉ multekoste (C); pagi tro karece, pagi tre altan prezon (K)
- 9) agnoski la vidpunkton de la kontraŭulo, akcepti la leĝon de la

.../...

.../...

venkinto; tranĉi la malfacilaĵojn (C); duonigi ion (K)

10) nenion plu, ne plu esperi rekapti la okazon (C); rezigni pri io (K)

\* \* \*

Al la oktobraj proponoj (N°98) venis tradukoj de S-roj Bourgois (B), Dauchez (Da), Despiney (De), Guillon (G) kaj Kraemer (K).

1) se porter comme un charme : glate sani (B); tute bonfarti kiel juna arbo (Da); belaspekti kiel karpeno (De); bonege farti (G); esti en bonega sanstato (K)

2) être dans ses petits souliers : sidi sur pingloj (B); sin senti ĝenata, malkomforta (Da); esti malhelpita (De); esti en mal-kontenteco morala (K)

RDLR : la traduko "atendi ian ĝojan okazaĵon" tute ne respondas al la signifo de la franca esprimo, pro tio ĝi ne aperas.

3) couper les ponts : rompi ĉiajn rilatojn (B); rompi la kontakton (Da); neigi la reiron (De); decidi tujan disiĝon (G); rompi abrupte ĉiujn rilatojn kun iu (K)

4) avoir une dent contre quelqu'un : konservi venĝemeton al iu, kontraŭ iun (B); esti venĝema al iu (Da); havi kolerecon kontraŭ iu, (De); esti iomete rankora kontraŭ iu (G);

5) jeter un oeil sur quelqu'un : direkti, glitigi sian rigardon ekrigardi iun (Da); rigardi iu (De); rigardeti iun (G); ekrigardi al iu (K)

6) parler d'une voix blanche / paroli per estingiĝanta voĉo (B) preskaŭ sensone paroli, nur lipe paroli (Da); paroli per sentembra voĉo (De); timeme, timvoĉe, malsonore paroli (K)

RDLR : "klarvoĉe paroli" esprimas ĝuste la malon; ankaŭ tiu traduko ne taŭgas.

7) être dévoré d'ambition : forkonsumiĝi pro ambicio (B); ambicio invadis lin (Da); esti turmentita pro ambicio (De); esti ambiciega (G); posedi ardan deziron akiri gloron, famon, honoron (K)

8) ne pas vouloir se mouiller : nepre ne kompromiti sin (B); prisilenti sian opinion (Da); ne riski (De); timi kompromitiĝon (G); ne deziri sin ligi, eniĝi aŭ implikiĝi en io (K)

9) Il ne l'emportera pas au paradis : pro tio li nepre pentos, lia konduto ja ne malfermos al li la prodojn de paradizo (B); Dio ne premios lin pro tio (Da); Dio juĝos lian malbonfaron (De); li sian malbonaĵon ne profitos (G);

10) rouler sur l'or : havi pli da mono ol la bezono (B,K); vivi en silko kaj veluro (B); lia mono abundas (Da); esti riĉega (De,G); posedi akcesan havaĵon (K)

Varman gratulon al S-ro Dauchez, la nekontestebla venkinto de tiu serio !



.../...

Ĉefaj solenaĵoj okazis en Frombork. Estris kardinalo-primaso Dr Stefan WYSZYNSKI. Partoprenis kardinaloj, episkopoj polaj kaj eksterlandaj, pastraro kaj ega aro da fideluloj el la tuta Pollando. Urbo Frombark estis ne nur urbo, kie loĝis, sed ankaŭ urbo, kie laboris la granda astronomo. Tie ankaŭ verŝajne troviĝas lia tombo, sed ĝis nun oni trovis nek ĉerkon, nek tombon.

Granda kanoniko Kopernik estas simbolo de scienco, kredo kaj amo al vero. Sekvantaj jarcentaj jarcentoj ekbrilos per novaj, grandiozaj steloj.

Sac. Dr. Zbigniew Kucewicz  
Pollando.

XX

KONGRESO DE LA FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO ( FKEA )

\* \* \*

ANGERS 11/12-an de Majo 1974

\* \* \*

KONGRESEJO : Villa Ste Anne, 23, rue Edouard Guinel, - 49000 ANGERS  
KORESPONDADRESO KAJ ALIĜOJ : S-ro R. Despiney, 43, quai de Champagne  
p.ĉ.k.-Paris 14 703 97 - 94170 LE PERREUX SUR MARNE  
ALIĜKOTIZOJ : individuo 6 Fr-  
geedza paro 8 Fr-  
infano ĝis 16-jara, blindulo, alilandano : senpage  
LIMDATO DE ALIĜO : 30-a de Aprilo 1974.

\* \* \*

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton, ekde la 14.00 : akcepto en la stacidomo kaj en la kongresejo  
16.00 : diskutrondetoj laŭ unu el le sekvantaj temoj :  
kiel interŝanĝi ideojn, kunlaboradi en internaciaj  
kristanaj movadoj (Pax Christi, Ekumenismo, katolika  
agado... ) malgraŭ la lingvaj baroj, aŭ pri liturgiaj  
problemoj.  
19.00 : komuna vespermanĝo  
20.30 : vespera kunveno  
Dimanĉon, je la 9.00 : jarkunveno de FKEA  
11.00 : diservo  
12.30 : komuna tagmanĝo  
14.00 : vizitoj al diversaj religiaj lokoj en aŭ  
ĉirkaŭ Angers.

\*

.../...

.../...

RESTADPRESOJ : vespermanĝo :	8 Fr-
nokto kaj matenmanĝo	7 Fr-
Lupreno de littukoj :	4 Fr-
tagmanĝo	10 Fr-

Bonvolu kunporti buŝ- kaj tualet- tukojn.

\*\*\*\*\*

A D M I N I S T R A      A N G U L O.

Dum la jarkunveno en Angers, oni renovigos 1/3 de la konsilio. Finis sian mandaton S-roj Barrier, Morin D., Véron kaj S-ino Vincent.

Konsiderante, ke S-ro D. Morin ne pagis kotizon depost 1971 kaj neniam ĉeestis konsilian kunvenon, la konsilio decidis eksigi lin.

Sekve, ĝi apelacias al ĉiuj agemaj anoj por ke ili kandidatiĝu kiel konsilianoj. Rekte skribu al nia ĝenerala sekretario :

S-ro Roger DESPINEY, 43, quai de Champagne, - 94170 LE PERREUX SUR MARNE

XX

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO DE LA 2-a DE DECEMBRO 1973

Ĉeestis : S-ino Vincent, F-ino Vanneau, F-to Marmou, S-roj Colas, Despiney, Ligot.

Petis senkulpigon : S-to Baudry, S-ro Bessière.

La kunveno malfermita je la 15-a daŭris ĝis la 17.30 H. Komence kaj fine ni diris "Patro Nia".

I - La protokolo de la antaŭ kunveno estis aprobita. Tamen S-ino Vincent prezentis taŭgan rimarkon pri la neceso ne fari financon decidon sen averti la kasistinon.

II - Diservo. okaze de la nacia Kongreso de U.F.E. (Saint-Etienne, 30 marto - 2 aprilo) Ni invitis Pastron Longoni. Ni atendas lian respondon. (Lastminute : S-to Longoni akceptas nian inviton).

III - Preparado de la nacia kongreso de nia Franca Katolika Esperanto Asocio en Angers 11/12 Majo 1974 ;

La konsilio studis la leterojn de la LKK.

La ĝenerala sekretario plezure legis leteron de Mro Henri MAZERAT, kiu akceptas la Honoran Patronadon de nia Kongreso.

La konsilio starigis provizoran programon, kiu aperos en la januara bulteno kun la aliĝilo.

Propono estas farita : ĉu Pastro Baudry ne povus prelegi franc-lingve pri Teilhard de Chardin ? la ĝ. s. faros al li demandon.

Ni invitos niajn protestantajn fratojn per letero al la ĉefredak-  
toro de "La Ponteto". Ankaŭ surloke la LKK povos inviti geprotestantojn



A L I Ĝ I L O

\* \* \*

NOMO KAJ VOKNOMO /:

NASKIĜDATO /

ADRESO :

Mi aliĝas al la kongreso de FKEA kaj samtempe pagas kiel kotizon al S-ro Roger Despiney p.ĉ.k. Paris 14 703 97 la sumon de ..... fr-

Mi uzos la jenajn servojn :

luprenon de littukoj	JES	NE
sabatan vespermanĝon	JES	NE
dimanĉan vespermanĝon	JES	NE
tranoktadon sabaton vespere	JES	NE
" dimanĉon vespere	JES	NE
dimanĉan matenmanĝon	JES	NE
lundan "	JES	NE
dimanĉan tagmanĝon	JES	NE

Mi proponas la jenajn servojn :

legadon dum la diservo	JES	NE
kantadon "	JES	NE
monkolekton	JES	NE

Mi alvenos la ..... -an de majo je la ... horo per aŭtomobilo/  
" vagonaro.

Mi forveturos la ..... an de majo je la ..... horo.

Mi bezonas .... fervoja(j)n rabatilo(j)n.

Dato kaj subskribo :

Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu persono de via familio.

Uzu samformadon paperon.

Nepre aliĝu antaŭ la 30-a de aprilo 1974.

ĜIS REVIDO EN ANGERS !!!

nenio

COPIED BY [unclear]

[unclear]

[unclear]

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

[unclear]

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..

... ..



